

| | | | |
|--|--|--|---|
| Johann Wolfgang von Goethe, Knab' rozeton vidis li | Johann Wolfgang von Goethe, Roz' sur erikejo | Johann Wolfgang von Goethe, La rozeto | Johann Wolfgang von Goethe, Rozeto en herbejo |
| <i>tradukita de Joachim Gießner</i> | <i>tradukita de Konrad Matheus</i> | <i>tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof</i> | <i>tradukita de Gotthilf Sellin</i> |
| Knab' rozeton vidis li; erikeja floro. Juna, bela estis ĝi. Por admiri kuris li ĝoje kun adoro. Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro. | Vidiĝis eta ruĝa roz' de knab', sur erikejo. Ĝi belis en matena ros'. Hastis li al juna ŝos' admiri ĝin kun ĝojego. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo. | Knabo vidis – jen rozeto Sur la kampo staras; Bela, juna la floreto . . . Vive kuras la knabeto, Ĝojas, miras, flaras. Sur la kampo la rozet' Kiel infanet'. | Knab' rozeton vidis li, Vidis en herbejo; Estis juna, bela ĝi, Por ĝin vidi kuris li, Vidis kun ĝojego. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo. |
| Diris knab': „Mi rompos vin, vi rozeta floro“. Diris roz': „Mi pikos vin, ke vi ne forgesos min, premas min doloro.“ Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro. | Diris knab': “Mi rompos vin, rozo sur erikejo.” Diris roz': “Dorn' pikos vin, por ke vi ne forgesu min. Al mi ne estu sufero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo. | Knabo diris : « mi el-tiros Belulinon mian »; Floro diris : « vi foriros, – Per pikiloj mi disŝiros Tuj la manon vian ». Sur la kampo la rozet' Kiel infanet'. | Diris knab': mi rompos vin, Rozon en herbejo, Diris roz': mi pikos vin, Ĉiam vi memoros min, Mi ne ĝin permesos. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo. |
| Knab' sovaĝa rompiss ĝin; erikeja floro. Rozo ja defendis sin kaj sufere pikis lin, ne utilis ploro. Rozo, rozo, ruĝa roz', erikeja floro. | Kaj knab' sovaĝa rompiss ĝin, rozon sur erikejo. En defend' roz' pikis lin. Sed ve' kaj aĥ' ne helpis ĝin. Venis sort' sen tolero. Ruĝa, ruĝa, ruĝa roz', roz' sur erikejo. | La sovaĝa knab' ridante La rozeton prenis, – La floreto batalante Sin defendis pikadante, Sed la sorto venis. Sur la kampo la rozet' Kiel infanet'. | Knab' sovaĝa rompiss ĝin, Rozon en herbejo; Kvankam roz' defendis sin, En koler' ĝi pikis lin, Tamen morti devis. Roz', rozeto, ruĝa roz', Rozo en herbejo. |
| ... | ... | ... | ... |

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 - †2003-11-25).

Arg-1022-2225 (2014-12-16 16:29:14)

Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en <http://arkivo.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de Konrad Matheus.

Arg-1022-2227 (2014-12-17 13:24:53)

S-ano Konrad Matheus loĝas en Mühlenweg 20, D-33038 Nieheim, Germanio.

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 - †1917-04-14).

Arg-1022-2070 (2014-05-23 12:25:14)

Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.

Traduko de la Germana poemo "Heidenröslein" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de GOTTHILF SELLIN (*1844-05-18 - †1921-10-09).

Arg-1022-2071 (2014-12-16 16:00:17)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en http://kantaro.ikso.net/rozeto_en_herbejo. Tie oni povas aŭdi ankaŭ la melodion. Pri la tradukinto vidu la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Gotthilf_Sellin.